Project Gutenberg's La Legendo de Dorm-Valeto, by Washington Irving

This eBook is for the use of anyone anywhere at no cost and with almost no restrictions whatsoever.  You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this eBook or online at www.gutenberg.org

Title: La Legendo de Dorm-Valeto

Author: Washington Irving

Translator: Edwin Grobe

Release Date: September 16, 2006 [EBook #19293]

Language: Esperanto

Character set encoding: UTF-8

*** START OF THIS PROJECT GUTENBERG EBOOK LA LEGENDO DE DORM-VALETO ***

Produced by Robert L. Read, William Patterson and the
Online Distributed Proofreading Team at http://www.pgdp.net

KLASIKAJ USONAJ NOVELOJ

WASHINGTON IRVING
(1783-1859)

# La Legendo de Dorm-Valeto

Esperantigis
EDWIN GROBE

1998
Eldonejo-Arizona-Stelo
1620 North Sunset Drive
Tempe, Arizona 85281-1550
Usono

"LA LEGENDO DE DORM-VALETO"
Unua Eldono: Majo 1998

Origina Anglalingva Titolo:
"THE LEGEND OF SLEEPY HOLLOW"

# Livros Grátis

http://www.livrosgratis.com.br

Milhares de livros grátis para download.

# LA LEGENDO DE DORM-VALETO

Malkovrita inter la Dokumentoj
de Forpasinta Didriko Knikerbokero

En la sino de unu el tiuj ampleksaj krekoj dentantaj la orientan bordon de Hudsono-Rivero, ĉe tiu larĝa pligrandiĝo de la akvovojo nomita fare de la antikvaj Nederlandaj navigistoj Tapan-Lago, kaj kie tiuj lastaj ĉiam antaŭzorge malaltigis siajn velojn, petante la protekton de Sankta-Nikolao dum la transnavigado, kuŝas eta merkatvilaĝo nomiĝanta ĉe kelkaj Verda-Vilaĝo sed kiu pli kutime kaj pli taŭge nomiĝas Lanto-Vilaĝo.

Tiun nomon, laŭonidire, elpensis antaŭtempe la estimataj dommastrinoj de la apudsituanta regiono pro enradikiĝinta inklino de siaj edzoj lanti ĉe la vilaĝa trinkejo en merkatotagoj. Kia ajn estu tio, mi ne garantias la fakton. Mi aludas ĝin nur dezirante esti preciza kaj aŭtenta.

Ne malproksime disde tiu vilaĝo—povas esti du mejlojn for—situas valeto, aŭ pli bone dirite, tersino, ĉirkaŭate de altaj montetoj, kiu estas unu el la plej trankvilaj lokoj de la tuta mondo. Malgranda rojo trafluetas ĝin, murmurante nur sufiĉakvante por lulripozigi preterpasanton. Malofta koturnfajfo aŭ pegklako estas preskaŭ la sola sono kiu iam interrompas la konstantan trankvilon.

Mi tion memoras, ke kiam mi estis junulo, mia unua provo pri sciurĉasado okazis en bosko de altaj juglandarboj kiu ombras unu flankon de la valo. Mi vageniris ĝin je tagmezo kiam la tuta naturo precipe silentis kaj min ektimigis la bruego de mia propra pafilo kiam ĝi rompis la ĉirkaŭantan sabatan trankvilon kaj ĝin daŭrigis kaj resonigis ties koleraj eĥadoj. Se iam mi dezirus ripozejon kie povi retiriĝi, forlasinte la mondon kaj ties distraĵojn, kaj pasigi revante la etan restaĵon de maltrankvila vivo, mi konas nenian ejon pli taŭgan ol tiu valeto.

Pro la senmova trankvilo de la loko kaj la kurioza karaktero de ties loĝantoj, kiuj estas posteuloj de la originaj Nederlandaj koloniintoj, tiu protektata valeto de longa tempo nomiĝas DORM-VALETO kaj ties rustikajn loĝantojn oni kromnomas DORM-VALETANOJ tra la tuta najbara regiono. Dormiga aŭ reviga influo ŝajnas superpendi la valeton kaj penetri la etoson mem. Iuj diras ke sorĉis la lokon grava Germana kuracisto dum la fruaj tagoj de la kolonio. Aliaj diras ke maljuna Indiana tribestro, ŝamano aŭ magiisto de sia gento, okazigis indiĝenajn ritojn tie antaŭ ol malkovris la landon Mastro Hendriko Hudsono.

Certe estas ke la loko daŭre agas subrege de iu magia potenco kiu trudas sorĉon al la mensoj de la tieaj bonhomoj, promenigante ilin en seninterrompa sonĝado. Ili estas adeptoj pri ĉiuj specoj de mirigaj kredoj, emas sperti trancojn kaj viziojn, ofte vidas strangajn eventojn, aŭdas muzikon kaj voĉojn en la aero. La tuta regiono abundegas je lokaj rakontoj, hantitaj pejzaĝoj kaj krepuskaj superstiĉoj. Steloj falas kaj meteoroj brilegas pli ofte super tiu valeto ol en aliaj partoj de la lando, kaj Inkubo, kun tuta armeo da Inkubidoj, ĝin utiligas kiel plej ŝatatan ludejon.

La rega fantomo kiu hantas tiun sorĉitan regionon tamen kaj

ŝajnas estri ĉiujn aerajn potenculojn, estas senkapa rajdanto. Kelkaj regionanoj raportas ke ĝi estas la fantomo de Hesa soldato kies kapon forportis kanonkuglo okaze de sennoma batalo de Sendependeco-Milito kaj kiun kamparanoj ekvidas de tempo al tempo antaŭenhastantan en la nokta malhelo kvazaŭ sur ventoflugiloj. La hantejoj de la fantomo situas ne nur en la valeto sed foje ampleksas apudirantajn vojojn kaj precipe la areon ĉirkaŭantan ne malproksiman preĝejon.

Efektive, kelkaj el la plej aŭtentaj historiistoj de la koncerna regiono, zorgeme kuniginte kaj kontrolkomparinte la malkonstantajn informerojn pri tiu aperantaĵo, asertas la jenon: la korpo de la soldato kuŝas enterigite en la preĝeja tombejo; la fantomo forrajdas ĉiunokte al la batalkampo serĉante sian kapon; pri la sagritma rapideco je kiu ĝi foje laŭiras la valeton, kvazaŭ noktomeza fulmaĵo, respondecas la malfrua horo kaj la bezono reveni al la preĝeja tombejo antaŭ nova tagiĝo.

Tia estas la ĝenerala enhavo de tiu legenda superstiĉo provizinta homojn de tiu ombroregiono per tiom da fantaziaj rakontoj. Kaj la fantomo nomiĝas antaŭ ĉiuj tieaj kamparaj kamenoj: la Senkapa Rajdanto de Dorm-Valeto.

Mirinde estas ke la viziemo kiun mi menciis ekzistas ne nur ĉe la denaskaj loĝantoj de la valeto. Senkonscie ĝin ensorbas ankaŭ ĉiu novalveninta valano loĝinta tie dum iom da tempo. Kiom ajn viglamensaj ili estis antaŭ ol eniri tiun dormlandon, ili ne rezistas enspiri baldaŭete la sorĉan influon de la aero kaj komencas fantazii: sperti sonĝojn, vidi aperaĵojn.

Mi mencias tiun trankvilejon kun la plej alta laŭdo ĉar estas jenloke, en tiaj malgrandaj izolitaj Nederlandaj valoj dise ensinigitaj en la granda Nov-Jork-Ŝtato ke ade senŝanĝiĝas loĝantaro, moroj kaj kutimoj, dum preterkuregas ilin senatente la torentego da migrado kaj pliboniĝo estiganta tiel senĉesajn ŝanĝojn en aliaj regionoj de tiu senripoza lando. Ili samas kiel tiuj etaj trankvilaj akvopoŝaĵoj apudlimigantaj rapidan rivereton en kiuj ni povas rimarki pajleron aŭ aerglobeton flosadi trankvile ĉeankre aŭ rotacii hezite en sia eta havenaĵo nepre malatentan pri la hastego de la pasanta fluo. Kvankam nun forpasis multaj jaroj ekde kiam mi subpromenadis la pigrajn ombrojn de Dorm-Valeto, mi preskaŭ certas povi renkonti la samajn arbojn kaj la samajn familiojn vivantajn ankoraŭ hodiaŭ en vegeta lantado en ties protektata sino.

En tiu kromloko de la naturo loĝis en malnova periodo de la Usona historio, tio estas, antaŭ ĉirkaŭ tridek jaroj, estimata estulo nomiĝanta Ikabodo Gruo kiu gastis, aŭ, laŭ sia vorto, "lantis" en Dorm-Valeto cele al instrui la infanojn de la komunumo. Li naskiĝis en Konektikuto, ŝtato provizanta Usonon per pioniroj ne nur por la arbaro sed ankaŭ por la mensaro kaj dissendanta ĉiujare armeojn da sovaĝejlimaj arbaristoj kaj kamparaj lernejestroj.

La familinomo Gruo ne maltaŭgis al lia persono. Li ege altis sed ege magris, havante mallarĝajn ŝultrojn, longajn brakojn kaj krurojn, manojn preterpendantajn laŭŝajne je tuta mejlo liajn manikojn, piedojn kapablajn funkcii kiel ŝoveliloj, kaj tutan framon ege malstreĉe muntitan. La kapon li havis malgrandan kaj platan supraĵe kun gigantaj oreloj; grandaj, verdaj, vitraj okuloj; kaj longa galinagnazo aspektanta kiel ventoflago sidanta sur lia spindelkolo por indiki la blovdirekton de la vento. Vidante lin laŭpaŝegi montetfirston en venta tago, dum liaj vestaĵoj pufiĝis kaj flirtis ĉirkaŭ li, oni povintus erare lin identigi kiel malsategdion surteren

malsuprenvenintan aŭ ĉifonan birdotimigilon elfuĝintan maizkampon.

Lia lernejo estis malalta unuĉambrega konstruaĵo krude muntita el ŝtipoj. La fenestroj estis duone vitritaj, duone riparitaj per apartaj folioj el malnovaj lernlibroj. Dum liberaj horoj genie sekurigis la lernejon fleksebla branĉeto tordita ĉirkaŭ la pordomanilon kaj palisoj starigitaj kontraŭ la fenestroŝutrojn. Tial, kvankam ŝtelisto povus ege facile eniri la ejon, iom ĝene estus ĝin eliri: ideo kiun la arkitekto, Josto Van-Haŭteno, pruntepreni sendube de la modelo de la mistera angilkaptilo.

La lernejo staris en iom soleca tamen plaĉa loko ĉebaze mem de arbara monteto proksime al fluanta rojo kaj sub la branĉoj de giganta betulo kreskanta ĉe unu ekstremaĵo. De tie oni povis aŭdi en dormiga somertago la mallaŭtan murmuradon de lernantaj voĉoj, recitantaj lecionojn, iom zumantaj kiel abeloj en abelujo, interrompataj de tempo al tempo far la aŭtoritata voĉo de la majstro, parolanta en minaca aŭ postula tono: aŭ, laŭhazarde, far la timiga sono de betulbranĉa vipo dum li urĝe antaŭenirigis malfruan lantinton laŭ la flora vojo de lernado. Verdire, li estis konscienca viro kaj ĉiam priatentis la oran maksimon: "Maluzu la vergon, miskonduku la infanon!" La lernantoj de Ikabodo Gruo ne miskondukiĝis.

Mi ne deziras pensigi tamen ke li nombriĝis inter tiuj kruelaj lernejaj potenculoj kiuj ĝuas dolorigi siajn subulojn. Tute kontraŭe, li disdonis justecon prudente, ne rigore, forigante la ŝarĝon de sur la dorsoj de la malfortaj, ĝin remetante sur tiujn de la fortaj. La etan duonkreskintan adoleskanton ekspasmantan je la unua movo de la vergo li preterpasis indulge. La postulojn de la justeco li plenumis trudante duoblan punon al iu malgranda, malbonkonduta, malbonsenca, larĝbaska, Nederlanda bubo kiu subverge paŭtis kaj pufiĝis kaj obstiniĝis kaj malafabliĝis. Ĉion tion li nomis "plenumi sian devon al la gepatroj" kaj neniam li estigis punon sen postaldoni la promeson tiel konsolan al la doloriĝanta bubo, ke "li memoros ĝin kaj dankos lin pro ĝi ĝis en la plej longa tago de sia vivo".

Kiam finiĝis la lerntago li eĉ kunuliĝis kaj kunludantiĝis kun la plej grandaj knaboj kaj en festotagaj posttagmezoj hejmenrevenigis konvoje kelkajn el la pli malgrandaj havantaj hazarde belajn fratinojn aŭ dommastrinajn patrinojn admiratajn pro ilia altkvalita kuirarto. Efektive, endis al li ade bonrilatiĝi kun la lernantoj. Tiom malmultkvantis la salajro kiun la lernejo pagis al li ke ĝi apenaŭ sufiĉintus lin provizi per ĉiutaga pano ĉar li estis avidega manĝanto kaj, kvankam maldika, disponis la sveliĝkapablon de anakondo. Feliĉe, laŭ la kampara kutimo de tiu regiono, la gepatroj de liaj lernantoj lin parte vivtenis, gastigante lin ĉe siaj farmbienoj. Ĉe tiuj li loĝis sinsekve laŭ posemajna vicoritmo. Tial li ĉirkaŭvizitis la tutan komunumon, kunportante ĉiujn surterajn posedaĵojn en katuna naztukego.

Por ke ĉio tio ne superŝarĝu la subtenkapablon de liaj kungastigantoj kamparaj kiuj emis konsideri lernejajn kostojn kiel dolorigan ĝenon kaj lernejestrojn kiel simplajn parazitojn, li disponis pri diversaj rimedoj sin fari utila kaj afabla. Foje li helpis la kultivistojn pri iliaj pli facilaj bientaskoj: rikoltante fojnon, riparante barilojn, trinkigante ĉevalojn, hejmenrevenigante bovojn elpaŝteje, tranĉante lignon por vintraj fajroj. Aldone li flankenlasis entute la regantan dignon kaj nepran potencon pere de kiuj li sinjoriĝis en sia lerneja imperieto kaj mirige mildiĝis kaj humiliĝis. Li sin favorigis ĉe la patrinoj dorlotante la infanojn, precipe

la plej junajn, kaj, kvazaŭ Biblia leono kuŝanta pace apud ŝafido, dum longa horsinsekvo kutimis sidi kun infano sur genuo, samtempe ŝancelante lulilon per la alia piedo.

Krom siaj ceteraj okupoj, li rolis kiel kantomajstro de la komunumo kaj gajnis multajn brilajn ŝilingojn instruante la junulojn pri psalmokantado. Ege fierigis lin stariĝi dimanĉmatene antaŭ la preĝeja adorantaro kun ĥoro da elektitaj kantantoj kaj tie, siaopinie, venki la influkonkurson kontraŭ la pastoro. Certe estas ke lia voĉo supersonis tiujn de la ceteraj kultanoj. Efektive, ankoraŭ hodiaŭ ekaŭdiĝas foje en trankvilaj dimanĉaj matenoj en tiu preĝejo strangaj tremaĵoj kaj eĉ duonmejlon for, ĉe la kontraŭflanka bordo de la muellageto, aŭtentaj postrestintaj sonaĵoj antaŭe elirintaj, laŭonidire, la nazon de Ikabodo Gruo.

Tial pere de diversaj etaj improvizadoj efektivigitaj en tiu genia maniero kutime nomiĝanta "per kurbo aŭ per zigzago", la digna pedagogo sufiĉe tolereble sukcesis, spertante, laŭ la opinio de ĉiuj nenion sciantaj pri mensa laboro, plaĉege facilan vivon.

Kutime, la lernejestro estas viro al kiu atribuas ioman gravon la loĝantinoj de kampara najbarejo. Tiuj lin taksas kiel specon de senokupa ĝentilhoma persono kies gusto kaj atingoj ege superas tiujn de la krudaj kamparaj amkandidatoj kaj kies scion superas nur tiu de la pastoro. Lia alveno tial emas estigi nemalmultan eksciton ĉe kampara biendoma tetablo kaj la alporton de preterkutima plado da kuketoj aŭ dolĉaĵoj povas okazigi la prezentadon de arĝenta tekruĉo. Nia literaturulo tial precipe feliĉiĝis ĉirkaŭate de la ridetaj vizaĝoj de la tiukamparaj fraŭlinoj. Kiom li kavalirumis por ili en la preĝeja antaŭkorto inter dimanĉmatenaj Diservoj, kolektante por ili vinberojn kreskantajn sur sovaĝaj vitoj superfluantaj en la apudaj arboj; deklamante por ilin distri ĉiujn epitafojn enĉizitajn sur la tomboŝtonoj; aŭ promenante kun tuta aro da ili laŭborde de la apude situanta muellageto. Intertempe la pli timidaj kamparbuboj postrestis ŝafhezitege, enviante liajn superajn elegantecon kaj lertecon.

Pro sia duonvagabonda vivstilo li estis krome speco de vojaĝanta ĵurnalo, transportante de domo al domo la tutan repertuaron da lokaj klaĉaĵoj. Rezulte, oni ĉiam salutis kontente lian alvenon. Aldone, la virinoj lin estimis kiel homon de granda scio ĉar li jam tralegis la kompletan enhavaĵon de pluraj libroj. Ekzemple, li majstre konis la historion de Nov-Anglia sorĉarto verkitan de Kotono Matero. Tiurilate, li rigore kaj forte kredis je la koncerna scienco.

Li estis, efektive, malkutima miksaĵo da etkvanta saĝeco kaj simpla kredemo. Lia apetito pri mirindaĵoj kaj lia kapablo ilin digesti egale eksterordinaris, pligrandiĝinte ambaŭe pro lia loĝado en tiu sorĉita regiono. Nenia rakonto tro krudis nek tro egis por lia ampleksa naiveco. Ofte plaĉis al li, je la fino de la instrutago, etendiĝi sur la abunda trifolitavolo laŭiranta la rivereton preterfluantan plorete la lernejon kaj tralegi tie la terurajn rakontojn de Multaĝulo Matero ĝis kiam la kreskanta malhelo nebuligis la presitan paĝon antaŭ lia rigardo.

Tiam, dum li antaŭenvagis apud marĉo, rivereto kaj timiga arbaro, celante atingi la biendomon kie li provizore gastis, ŝancelis lian ekcititan imagon ĉiu sono de la naturo okazanta je tiu sorĉhoro: la ĝemo de la kaprimulgo fontanta el la montetdeklivo; la minaca kriego de la arbobufo anoncanta eventualan ŝtormon; la malfeliĉiga ululo de la kriĉstrigo;

aŭ la subita susurado de birdoj ektimintaj en sia arbusta ripozejo. Eĉ la lampiroj, kiuj lumiĝis la plej brile en la plej malhelaj lokoj, surprizegis lin de tempo al tempo kiam unu transflugis kun malkutima helego lian irvojon. Kaj se, hazarde, giganta stulta koleoptero fuŝflugis kontraŭ lin, la kompatinda estulo pretis adiaŭi sian animon, opiniante ke lin trafis sorĉistina magiaĵo.

Lia sola rimedo en tiaj momentoj, ĉu por nuligi ĉiun pensagadon, ĉu por forpeli malbonajn spiritojn, estis ekkanti preĝejajn himnojn. Kaj la bonvolaj loĝantoj de Dorm-Valeto, sidante vespere antaŭ siaj ĉefpordoj, ofte miregis ekaŭdante lian nazalan melodion "en kunligita dolĉeco longe daŭrigata" ŝvebantan super fora monteto aŭ laŭ krepuska vojo.

Cetera fonto de timiga plezuro estis pasigi longajn vintrajn vesperojn kun la maljunaj Nederlandaj edzinoj dum tiuj sidis ŝpinante apudfajre kaj vico da pomoj rostiĝis ŝprucsiblante laŭkamene. Tie li aŭskultis iliajn mirindajn rakontojn pri fantomoj kaj koboldoj kaj hantitaj kampoj kaj hantitaj riveretoj kaj hantitaj pontoj kaj hantitaj ĉevaloj kaj precipe pri la senkapa rajdanto aŭ Galopanta Heso de la Valeto kiel oni foje lin nomadis. Li ĝojigis ilin reciproke per siaj anekdotoj pri sorĉarto kaj pri la teruraj aŭguroj kaj minacaj sonoj kaj vidaĵoj okazintaj en la aero de pasintepoka Konektikuto. Li timigis ilin veege kun antaŭanoncoj pri kometoj kaj falsteloj kaj la maltrankviliga informo ke la terglobo nepre rotacias, rezulte de kio ili staras duonon de ĉiu tago kaposubpiede.

Tamen se tio ĉio alportis plezuron al li dum li komfortiĝis kompaktakorpe en la kamenangulo de iu ĉambro ruĝbrilanta pro sia krepitanta lignofajro kaj kie, kompreneble, nenia fantomo kuraĝis sin vidigi, tiun plezuron li devis postkompensi per la teruroj de sia hejmendirekta revenvojo. Kiel timigaj formoj kaj ombroj obstrukcis lian antaŭenirejon en la pala kaj aĉa brilego de iu neĝa nokto! Kun kiel dezira rigardo li okulkontrolis ĉiun tremantan lumradieton traglitantan la nudajn kampojn ekde fora fenestro! Kiel ofte ektimigis lin neĝkovrita arbusto apudstaranta lian vojon kiel fantomo surportanta blankan littukon! Kiel ofte li ekkaŭris pro sangokazeiga timego okazigita de la sono kiun liaj irpaŝoj estigis subpiede sur la frosta krusto kaj malkuraĝis rigardi malantaŭen por ne devi ekvidi tie aĉegan estaĵon lin posttretantan! Kaj kiel ofte nepre konsternigis lin iu preterhastanta ventoblovego hurlanta interarbe kaj povanta esti la Galopanta Heso efektiviganta unu el siaj ĉiunoktaj rajdatakoj.

Ĉiuj tiuj estis tamen nuraj noktoteruroj, mensaj fantomoj kiuj promenadas nur en la malhelo. Tial, kvankam li jam vidis multajn fantomojn dum sia vivotempo kaj Satano jam ofte lin atakis diversforme okaze de liaj solecaj vagiradoj, ĉiujn tiujn malbonaĵojn nova tagiĝo ĉesigis. Rezulte, li povintus ĝuadi plaĉan vivon, malgraŭ la diablo kaj liaj agadoj, se jam ne transpasis lian irvojon estaĵo kiu perpleksas la viran genron pli ol fantomoj, koboldoj kaj la tuta sorĉistinaro kunagantaj, kaj tio estis: virino.

Inter la muzikdisĉiploj kunvenantaj unu vesperon ĉiusemajne por aŭskulti lian instruadon pri psalmokantado nombriĝis Katrino Van-Taselo, solinfano de multhava Nederlanda farmbienestro. Ŝi estis floriĝanta, freŝhaŭta, dekokjara fraŭlino; diketa kiel perdriko; kvazaŭ manĝinda, fandiĝema; ruĝetvanga kiel unu el la patraj persikoj; kaj universale konata ne nur pro sia beleco sed ankaŭ por sia estonta heredaĵo. Ŝi estis aldone iom koketa, laŭ la indico, ekzemple, de sia vestaĵaro, kiu estis miksaĵo de pasint- kaj

nuntempaj modoj elektitaj laŭvole por reliefigi ŝiajn fizikajn ĉarmojn. Ŝi surportis purorajn juvelaĵojn transoceanigitajn el Zandamo de ŝia pra-pra-avino, allogan stomakaĵon de antikvaj epokoj, kaj provoke mallongan subjupon elektitan sendube cele al elmontri la plej belajn piedojn kaj maleolojn de la tuta ĉirkaŭanta kamparo.

La koro de Ikabodo Gruo spertis dolĉajn kaj stultajn sentojn pri la ina sekso. Ne mirinde estas tial ke tiel tenta mordindaĵo baldaŭ ekplaĉis al lia rigardo kaj plej precipe post kiam li gastiĝis en la domego de ŝia patro. Altaĝulo Baltuso Van-Taselo estis perfekta portreto pri sukcesa, kontenta, grandanima kultivisto. Vere estas ke nur malofte li direktis la rigardon aŭ la pensadon preter la limojn de sia bieno, sed ene de tiuj limoj ĉio estis komforta, feliĉa kaj bonfarta. Li kontentis sed ne fieris pri sia riĉeco. Lin ĝojigis ne la stilo sed male la abundo de lia vivkapablo.

Lia bieno situis surborde de Hudsono-Rivero en unu el tiuj verdaj, ŝirmataj, fekundaj kaŝejoj en kiuj tiel ĝojas enhejmiĝi Nederlandaj kultivistoj. Grandega ulmo etendis siajn larĝajn branĉojn super ĝi. Ĉebaze de la ulmo suprenbobelis fonto de la plej milda kaj dolĉa akvo, plenigante etan puton konsistantan el barelo, tiam forfluetante scintilante tra la herbo ĝis najbara rojo antaŭensaltetanta inter alnoj kaj nansalikoj.

Proksimege al la loĝdomo staris vasta labordomo kapabla funkcii kiel preĝejo kaj de kiu ĉiu fenestro kaj ĉiu niĉo preskaŭ eksplodis pro ties pleniganta enhavaĵo da farmbientrezoroj. La draŝilo sonoradis ĉi-ene de mateno al nokto. Diversspeciaj hirundoj vagflugetis pepante inter la tegmentaj aleroj, preskaŭ ilin tuŝante. Ĝuis la surtegmentan sunbrilon vicoj da kolomboj, el kiuj kelkaj rigardis la ĉielon unuokule, kvazaŭ kontrolante la veteron, dum aliaj kaŝis la kapon subflugile aŭ enbruste kaj ceteraj, pufiĝante kaj rukulante, riverencadis antaŭ siaj inoj.

Glathaŭtaj malgraciaj porkegoj gruntis en la trankvilo kaj abundo de sia enfermejo el kiu provekskursis hazardamomente trupoj da suĉporkidoj, kvazaŭ flaretante la aeron. Eleganta eskadro da neĝkoloraj anseroj vagnavigadis sur apuda lageto, konvojante tutajn flotojn da anasoj. Regimentoj da meleagroj ĉirkaŭpromenis glugluante en la korto kaj gvinbirdoj vagadis inter ili plendante, same kiel malbonhumoraj dommastrinoj, kun malafabla, malkontenta grakado. Antaŭ la bestodoma pordo paradis estimata virkoko, modela edzo, batalisto kaj altranga sinjoro, sonigante siajn brilpoluritajn flugilojn kaj kokerikante pro profundakoraj fiero kaj ĝojo, foje disŝirante la teron perpiede, tiam malavare alvokante sian ĉiam malsatan familion de edzinoj kaj idoj, ilin invitante ĝui ĵus malkovritan bongustan mordaĵon.

La buŝo de la pedagogo salivis dum li spektadis tiun luksan promeson de riĉega vintra nutraĵo. En sia anticipe malsata imago li bildigis ĉiun rostoporkon vagkurantan kun enstomaka pudingo kaj enbuŝa pomo. La kolombojn lia imago enlitigis en komfortan torton kaj ŝirmigis sub flankovrilo. La anseroj naĝis en sia propra viandosaŭco. La anasoj poduiĝis komforte entelere, kiel komfortaj geedzaj paroj, kun adekvata provizo da cepsaŭco. Ĉe la porkoj li antaŭimagis glate eltranĉitajn lardoflankojn kaj sukplenan dolĉagustan ŝinkon. Ĉiun meleagron li okultaksis kvazaŭ jam delikate fadenligitan, kun ties maĉostomako deponita subflugile, kaj eble surportantan kolĉenon da saporaj kolbasoj. Kaj eĉ brilkolora kantokoko mem dissterniĝis surdorse en apudtelero kun ungegoj suprenlevitaj,

kvazaŭ petante tiun kompaton kiun dumvive ĝia kavalireca spirito disdegnis.

Dum, ravite, Ikabodo imagis ĉion tion, kaj dum li vojaĝigis sian verdokulegan rigardon trans la dikajn paŝtejojn, la riĉajn kultivkampojn de tritiko, sekalo, fagopiro kaj Indiana maizo kaj la hortojn ŝarĝitajn de ruĝa frukto ĉirkaŭantajn la varman terenaron de Van-Taselo, lia koro sopiris al la fraŭlino iun tagon heredonta tiujn posedaĵojn. Lia imago plibonigis la ideon, antaŭplanante kiel ilin monigi kaj kiel investi tiun monon por grandaj vastaĵoj da tero kaj ŝindopalacoj en la sovaĝejo. Male, lia aktiviĝanta fantaziemo jam konkretigis liajn esperojn kaj elmontris al li la floriĝantan Katrinon kun plena familio da infanoj, sidantan sursupraĵe de ĉarego ŝarĝita de hejmaj varaĵoj dum potoj kaj kaldronoj pendas malsupre. Sin mem li imagis rajdantan bonpaŝan ĉevalinon sekvatan postkalkane de ĉevalido survojiĝantan cele al Kentukio, Tenesio aŭ Nia Ĉiela Sinjoro scias kien.

Kiam li eniris la domon finvenkiĝis lia koro. Ĝi estis unu el tiuj grandspacaj biendomoj havantaj altfirstajn sed malaltdeklivajn tegmentojn, konstruitaj laŭ stilo transdonita de la unuaj Nederlandaj koloniintoj. La malaltaj elstarantaj aleroj estigis laŭfasadan galerion enfermeblan en malbona vetero. Sub tiu pendis draŝiloj, jungilaro, diversaj kultiviloj kaj retoj por fiŝkaptado en la najbara rivero. Benkoj estis konstruitaj laŭ la galeriaj flankoj por somera uzado, dum granda ŝpinrado situanta unuekstremaĵe kaj buterigilo troviĝanta aliekstremaĵe indikis kiel diversmaniere la loĝantaro povis utiligi tiun gravan porĉon.

Ekde tiu laborejo Ikabodo eniris, mirante, la halon konsistigantan la centron de la domego kaj ties ĉefan estejon. Ĉi-tie vicoj da brilegaj stanalojaĵoj, arанĝite sur longa telerŝranko, blindumis liajn okulojn. En unu angulo staris granda sako da ŝpinota lano; en alia, provizo da linaĵo-lanaĵo ĵus teksita. Maizspikoj kaj surfadene sekigitaj pomoj kaj persikoj pendis en gajaj festonoj laŭ la muroj, intermiksite kun la puco de ruĝaj kapsikoj.

Duonaperta pordo povigis lin ekvideti la gastosalonon kie la unglegpiedaj seĝoj kaj malhelaj mahagonaj tabloj brilis kiel speguloj. Moreloj kaj ĝiaj kunfunkciaj ŝovelilo kaj prenilo scintilis de sub sia asparagfilika kovrilo. Falsoranĝoj kaj konkoj ornamis la kamenbreton. Super ĝi pendis diverskoloraj surfadenaj birdovoj. Grandega strutovo pendis deplafone en la mezo de la ĉambro. Tra intence malfermita pordo angula ŝranko elmontris abundan trezoron da malnovaj arĝentaĵoj kaj bonriparitaj fajencoj.

De la momento kiam Ikabodo ekvidis tiun plaĉegan areon finhaltis lia mensa paco kaj ekfariĝis lia ununura celo la eltrovo de rimedo sin amigi de la senegala Van-Taselo-filino. Por sukcesigi tiun entreprenon tamen li spertis pli da malfacilaĵoj ol la hazardo kutime spertigis al Mezepokaj prodoj kiuj plejofte devis batali gigantojn, sorĉistojn, fajrspirajn drakojn kaj ceterajn tiajn facile venkotajn malamikojn, malfermante sian vojon tra nuraj fer-kaj-latunpordegoj kaj diamantoŝtonaj muroj ĝis la kastela fortikaĵo kie enfermiĝis la celulino de lia koro: ĉion kion li sukcesigis tiel facile kiel viro tranĉanta ĝiscentre Kristnaskan torton post kio la savita damo senescepte konsentis edziniĝi kun li.

Ikabodo, tute kontraŭe, devis venki la koron de kampara koketulino vaganta en labirinto da kapricoj kaj apetencoj ĉiam

starigantaj novajn ĝenojn kaj malhelpojn. Kaj li devis alfronti armeon da timigaj karno-kaj-sangaj kontraŭstarantoj kaj abundon da kamparaj amkandidatoj atakantaj ĉiun enirejon al ŝia koro, sin okulkontrolantaj zorge kaj kolere unu la alian, sed pretaj kunligi siajn potencojn kontraŭ ĉiu nova konkursanto.

Inter tiuj la plej imponega estis solidkorpa, brubuŝa, ludvola homo nomiĝanta Abrahamo, aŭ, laŭ la Nederlanda mallongigo, Bromo Van-Brunto, heroo de la ĉirkaŭanta regiono kiu resonis per raportoj pri liaj atingoj de fortiko kaj kuraĝo. Li estis larĝŝultra kaj duoble artikita, havis mallongan nigran bukloabundan hararon kaj krudan sed ne malplaĉan vizaĝon elmontrantan miksaĵon da ĝojo kaj aroganteco. Pro sia Herkula korpoframo kaj korpomembra potencego li kromnomiĝis Bromo Ostaro kaj tiel lin identigis ĉiuj.

Li renomis pro siaj grandaj scio kaj lerto pri rajdado, havante tiom da surĉevala rajdkapablo kiel Tataro. Li superis okaze de ĉiuj konkursoj kaj kokbataloj. Kun la supereco kiun akiras korpa fortiko en kamparaj komunumoj li arbitraciis en ĉiuj disputoj, metante sian ĉapelon oblikvangule kaj anoncante siajn decidojn en maniero kaj kun voĉtono permesantaj nenian kontraŭstaron, nenian apelacion. Li pretis ĉiam batali aŭ kaprioli, sed lia karaktero estis pli petola ol malbonvola. Malgraŭ sia ĝenerala krudeco, li posedis ĉebaze forton emon al ŝerca bonhumuro.

Li havis tri-kvar bonajn kunulojn kiuj kondutis laŭ lia modelo kaj estrante kiujn li ĉirkaŭvizitis la regionon, partoprenante en ĉiuj kvereloj aŭ distriĝoj okazantaj en radiuso de multaj mejloj. Kiam la vetero estis malvarma lin eminentigis peltĉapo surmuntita de pavanta vulpovosto. Kiam ĉeestantoj de kamparaj kunvenoj vidis tiun bone konatan kreton vagflirtadi malproksimdistance inter aro da agresemaj rajdantoj, senmanke ili atendis disputŝtormon. Foje lia brigado aŭdiĝis preterhastegante la regionajn biendomojn je noktomezo, vokante kaj kriegante, kvazaŭ Don-Rivervalo-Kozakaro. Tiaokaze la maljunaj sinjorinoj, vekite el profunda dormado, aŭskultis momenton ĝis la forpaso de la hastaĵo-rapidaĵo kaj tiam deklaris: "Ho! Jen forpasis Bromo Ostaro kaj lia kunularo!" La najbaroj lin konsideris kun miksaĵo da miro, admiro kaj bonvolo kaj kiam okazis en la komunumo iu ajn fantazia ŝercaĵo aŭ rustika kverelo ili ŝancelis la kapon, hipotezante ke ĝin kaŭzis Bromo Ostaro.

Ekde jam kelke da tempo tiu sendisciplina heroo elektis la floriĝantan Katrinon kiel celobjekton de siaj krudaj galantaĵoj kaj, kvankam lia amindumado iom pripensigis karesojn kaj ammanovrojn de urso, laŭoniflustre la knabino ne nepre emfaze malkuraĝigis liajn esperojn. Verfakte estas ke lia amkampanjo efektivigis aŭtomate la retiriĝon de rivalaj kandidatoj sentantaj nenian deziron kontraŭbatali amoreman leonon. Rezulte, kiam la ĉevalo de Bromo vidiĝis starante dimanĉvespere antaŭ la domo de Van-Taselo, ŝnurligite al la tiea barilo, preterpasantoj certis ke la mastro de la besto sidas en la doma enaĵo, amindumante aŭ "amscintilante", kiel kromnomiĝis tia entrepreno, kaj ĉiuj ceteraj kandidatoj preterpasis senespere la lokon, preferante militi sur ceteraj batalkampoj.

Tia estis la imponega rivalo kun kiu Ikabodo Gruo devis lukti kaj, ĉion konsiderante, pli forta viro ol li retiriĝintus el la konkurso dum malesperintus pli saĝa viro. Li disponis en sia karaktero tamen pri miksaĵo da fleksebleco kaj persistado. Forme kaj spirite li iom similis "saltojoĉjon", tiun flekseblan grimpoplanton kiun oni ofte utiligas kiel irbastonon; cedema,

tamen malmola, kvankam li kliniĝis, neniam li rompiĝis; kaj kvankam li kurbiĝis sub la plej malforta premo, ekde kiam ĝi forleviĝis, sammomente li ekvertikaliĝis kaj ree portis la kapon tiel alte kiel iam ajn antaŭe.

Eniri la batalarenon malkaŝe kontraŭ la rivalo estintus ega malsaĝeco, ĉar Bromo, same kiel tiu fajra amanto Aĥilo, ne estis viro malhelpota pri siaj amentreprenoj. Tial Ikabodo efektivigis siajn manovrojn en trankvila kaj milde kamuflita maniero. Sub la ŝirmo de sia funkcio kiel kantomajstro, li vizitis la biendomon ofte. Certe, li devis timi nenian sintrudan intervenon flanke de la gepatroj, kiuj tiel ofte estiĝas obstakloj sur la vojo de amantoj. Balto Van-Taselo estis facila dorlotema persono. Li amis sian filinon pli kare ol sian pipon kaj, kiel bonsenca viro kaj bonkora patro, permesis ke ŝi kondutu laŭvole en ĉiu agadkampo.

Aldone lia rimarkinda edzineto ĉiam sufiĉe okupiĝis prizorgante sian domon kaj siajn kortobirdojn. Laŭ ŝia saĝa deklaro, anasoj kaj anseroj estas stultaj estaĵoj kiujn oni devas zorge priatenti; knabinoj tamen kapablas sin prizorgi proprapersone. Tial dum la aktiva dommastrino okupiĝis tra la tuta domo, aŭ utiligis la ŝpinradon ĉe unu ekstremaĵo de la verando, la honesta Balto sidis ĉe la kontraŭa ekstremaĵo, fumante sian pipon, spektadante la sukcesojn de la ligna soldato kiu, armite ĉiumane de glavo, batalis kuraĝe la venton sur la bestodoma tegmento. Samtempe, Ikabodo amindumis la filinon apud la rojo sub la granda ulmo, aŭ ĉirkaŭpromenigis ŝin en la krepuska lumo, tiu horo tiel helpa al la elokventeco de amantoj.

Mi ne pretendas scii kiel oni amindumas kaj venkas virinajn korojn. Miaopinie ili estas ekde ĉiam studobjektoj de enigmo kaj admiro. Kelkaj havas ŝajne ununuran atakeblan flankon aŭ atingopordon. Aliaj havas mil alvenvojojn kaj kapteblas en mil malsamaj manieroj. Gajni la unuajn estas granda triumfo de lerteco. Estas ankoraŭ pli granda pruvo de generaleco gajni kaj daŭre reteni la lastajn, ĉar viro devas protekti la fortreson batalkoste ĉe ĉiu pordo kaj ĉiu fenestro. Tiu kiu gajnas mil ordinarajn korojn rajtas tial iom famiĝi. Tiu tamen kiu gajnas kaj ade regas senrivale la koron de koketulino estas aŭtenta heroo. Tia ne estis, certe, la kazo de la imponega Bromo Ostaro kaj ekde tiam kiam Ikabodo Gruo komencis efektivigi iomajn progresojn la avantaĝoj de tiu antaŭa verŝajne malpligrandiĝis. La ĉevalo de Bromo ne plu vidiĝis starante antaŭ la Van-Tasela domo en dimanĉaj vesperoj kaj letala kverelado estiĝis inter li kaj la lernejestro de Dorm-Valeto.

Bromo, kies karaktero ampleksis iomon da kruda kavalireco, bonvolintus solvi la problemon per aperta militado, kontraŭstarante aliajn pretendojn pri la damo laŭ la modo de tiuj ege koncizaj kaj ege simplaj logikistoj de antikvaj epokoj, la vagkavaliroj: per vir-kontraŭ-vira kombato. Sed Ikabodo tro konsciis pri la supera potenco de sia kontraŭstaranto por konsenti eniri la batalarenon kun tiu. Li jam subaŭdis fanfaronadon de Bromo laŭ kiu tiu "refaldos la lernejestron kaj deponos lin sur breton de lia propra lernejo" kaj li estis tro singarda por estigi al tiu la okazon.

Estis en tiu obstine paca sistemo iu ege provoka. Restis al Bromo nenia alternativo krom ekutiligi la provizojn da rustika ŝercado pri kiuj li disponis kaj okazigi krudajn trompludojn kontraŭ sia rivalo. Tial Ikabodo fariĝis viktimo de kaprica persekutadkampanjo entreprenita de Bromo kaj lia aro da krudaj kunrajdantoj. Ili ĉagrenadis lian ĝis nun pacan estrejon. Ili ŝtopis la fumtubon kaj tiamaniere fumpelis la klientojn de la kantolernejo. Ili enrompiĝis la lernejon dumnokte,

malgraŭ ĝiaj imponegaj fiksfermaĵoj (pordo-vimentigoj kaj fenestropalisoj) kaj tohuva-bohuigis ĉion, rezulte de kio la kompatinda lernejestro komencis opinii ke ĉiuj sorĉistinoj de la lando tie kunvenis. Sed eĉ pli ĝenis lin tio ke Bromo elprofitis ĉiun oportunon lin ridindigi antaŭ lia damo. Ekzemple, tiu havis kanajlan hundon kiun li instruis ploraĉi en la plej absurda maniero kaj prezentis kiel rivalon de Ikabodo pri la arto de psalmokantado.

La afero antaŭenevoluis tiumaniere dum kelke da tempo sen rezultigi materialan efikon en la relativa situacio de la kontraŭstarantaj potenculoj. En bela aŭtuna posttagmezo, Ikabodo, spertante penseman humoron, sidis reĝpoze sur la alta skabelo ekde kiu li kutimis superrigardi ĉiujn eventojn de sia eta literatura imperio. En la mano li balancis punbastoneton, tiun sceptron de despota potenco. Betula vipilo, simbolo de justeco, ripozis sur tri najloj malantaŭ la trono, konstanta teruraĵo por malbonkondutaj lernantoj. Sur la instrutablo antaŭ li vidiĝis diversaj kontrabandaĵoj kaj malpermesataj armiloj malkovritaj sur la personoj de senokupaj buboj: kiaj duonmanĝitaj pomoj, aerpafiloj, giriloj, muŝkaĝoj, kaj kompletaj legioj da etaj paperaj ludkokoj furiozantaj. Verŝajne tre lastatempe trudiĝis iu terura prijusteca akto ĉar ĉiuj liaj lernantoj okupiĝis atente pri siaj libroj aŭ flustris ruze malantaŭ ili, samtempe kontrolante kaŝrigarde la majstron. Tial speco de zuma silento regis tra la tuta lernĉambro.

Interrompis la silenton la subita apero de Negro surportanta stupotolajn jakon kaj pantalonon kaj rondkronan ĉapelfragmenton similantan la ĉapon de Merkuro. Sidante surdorse de nekombita, sovaĝaspekta, nur duondresita ĉevalido kiun, ne havante kaprimenon, li gvidis pere de ŝnuro, li alvenis klakadante la lernejan pordon kaj transdonis leteron invitantan Ikabodon partopreni en ĝojfesteno aŭ "peplomdistraĵo" okazontan tiun vesperon ĉe S-ro Van-Taselo. Liverinte sian mesaĝon kun mieno de graveco kaj vortelekto de altkvalito kiujn Negroj emas elmontri okaze de tiaj etaj misioj, li transiris haste la rivereton kaj forkuretis laŭvale, sin admirante pro la rango kaj la urĝo de sia tasko.

Nun ĉio estis hastado kaj bruado en la ĵus antaŭe trankvila lernĉambro. La lernantojn la instruisto rapidigis tra la lecionoj sen paŭzi por pritrakti sengravaĵojn. La lertaj preteratentis senpune duonon el siaj taskoj. La mallertaj ricevis de tempo al tempo fortan surpostaĵan instigaĵon devigantan ilin plirapidiĝi aŭ kuraĝigantan ilin ekkompreni malfacilan vorton. Libroj ĵetiĝis surplanken sen surbreta remetiĝo. Inkujoj renversiĝis, benkoj flankenŝoviĝis kaj la tuta lernantaro liberiĝis unu horon frue, hastante eksplode eksteren kiel legio da junaj diabletoj, kriegante kaj bruegante sur la gazono, gajigite pro sia antaŭhora forsendiĝo.

La galanta Ikabodo pasigis almenaŭ suplementan duonhoron pri sia tualeto, brosante kaj renovigante sian plej bonan kaj verfakte ununuran kompleton de rustonigra koloro kaj aranĝante sian aspekton helpe de peco de rompita spegulo pendanta surmure en la lernĉambro. Por ekaperi ĉe sia damo laŭ aŭtenta kavalira stilo li prunteprenis ĉevalon de la kultivisto tiam lin gastiganta, kolerema maljuna Nederlandano nomiĝanta Johano Van-Ripero kaj, tiel galante surseliĝinte, survojiĝis kvazaŭ vagkavaliro serĉanta aventurojn.

Sed decas, laŭ la aŭtenta spirito de romantika rakontado, ke mi transdonu priskribon pri la aspekto kaj la ekipaĵo de mia heroo kaj lia ĉevalo.

La besto kiun li surrajdis estis disfalinta plugĉevalo pretervivinta preskaŭ ĉion krom sia malicemo. Ĝi estis marasma kaj dikvilega kun ŝafinkolo kaj martelkapo. Ĝiaj rostaj kolhararo kaj vosto estis implikitaj kaj noditaj je lapoj. Unu okulo perdis sian pupilon kaj havis koleran, fantoman rigardmanieron. La alia tamen elmontris la briladon de vera diablo. Tiomalgraŭe ĝi estis sendube fajra kaj spirita en sia bona epoko se ni juĝu laŭ ĝia nomo: Pafilpulvo. Efektive ĝi estis antaŭe ŝatata rajdĉevalo de sia mastro, la kolerema Van-Ripero, kiu estis agresema rajdanto kaj impregnumis la beston, povas esti, je iom de sia propra spirito, ĉar, kvankam ĝi havis maljunan paneintan aspekton, kaŝiĝis en ĝi pli da diableco ol en iu ajn juna ĉevalo.

Ikabodo estis taŭga figuro por tia besto. Li rajdis kun mallongaj piedingoj kiuj levis liajn genuojn preskaŭ al la nivelo de la selpomelo. Liaj kubutoj elŝoviĝis kiel akridkruroj. Li portis sian vipon perpendikulare en la mano kiel sceptron. Dum lia ĉevalo antaŭentrotis, lia brakmovaro multe pensigis pri la batado de flugiloj. Malgranda lanĉapelo sidis sursupraĵe de lia nazo ĉar tiel oni rajtus nomi lian mallarĝan, striaspektan frunton. La basko de lia nigra jako preskaŭ atingis flirtante la voston de la ĉevalo. Tiel aspektis Ikabodo kaj lia rajdbesto kiam ili eliris trenmarŝante la barilpordon de Johano Van-Ripero: aperaĵo nepre malkutime renkontata dum plena taglumo.

Estis bela aŭtuna tago, kiel mi jam diris. La ĉielo estis klara kaj trankvila kaj la naturo surportis tiun riĉan oran livreon kiun ni kunligas ĉiam al la koncepto de abundo. La arbaroj vestiĝis en sobraj brunoj kaj flavoj dum kelkajn pli malfortajn arbojn la frostoj jam vundetis, ilin farbinte per brilegaj oranĝaj, purpuraj kaj skarlataj koloroj. Glisantaj vicoj da sovaĝaj anasoj komencis aperi altnivele en la ĉielo. La bojo de la sciuro aŭdiĝis elirante la fag- kaj hikoriboskojn kaj de tempo al tempo la pensema fajfo de la koturno sonis en la najbara stoplejo.

La birdoj ĝuis siajn adiaŭbankedojn. En la abundo de sia festado ili flugetis, pepante kaj kapriolante, interarbuste, interarbe, kapricaj pro la kvanto kaj la diverseco ilin ĉirkaŭantaj. Vidiĝis la honesta virturdo, la plej ŝatata predaĵo de komencantaj ĉasistoj, kun sia laŭta, plendema noto; kaj la kvivitantaj merloj, flugante en zibelkoloraj nubaĵoj; kaj la orflugilspego, kun siaj karmezina hupo, plenforma nigra gorĝo kaj belega plumaro; kaj la cedrobirdo kun siaj ruĝpintaj flugiloj kaj flavpinta vosteto kaj sia Hispanaspekta hupĉapo; kaj la blua garolo, tiu brua dando vestita en palblua jako kaj blankaj subvestaĵoj, kriĉante kaj babilante, kapjesante kaj saltante kaj riverencante, ŝajnigante disponi bonajn rilatojn kun ĉiu boskokantanto.

Dum Ikabodo trotetis malhaste laŭvoje, lia rigardo, ĉiam serĉante ĉiun simptomon pri gastronomia abundo, kontrolis kun plezuro la trezorojn de la bela aŭtuno. Ĉiuflanke li rimarkis vastajn provizojn da pomoj: iuj pendantaj kun prema riĉeco surarbe; aliaj kunigitaj en korboj kaj bareloj por la merkato; ceteraj amasigitaj konusforme por la cidropremilo. Pli fore li ekvidis grandajn kampojn da Indianmaizo, kun ĝiaj orkoloraj spikoj gvatantaj eksteren el siaj foliaraj kovriloj kaj promesantaj aliiĝi en kuketojn kaj rapidpudingojn. Aldone vidiĝis, kuŝante submaize, flavaj kukurboj, suprenturnante siajn belajn rondajn ventrojn sunodirekten kaj antaŭanoncante siajn kvalitojn kiel luksegaj tortoj. Kaj baldaŭ poste li preterpasis la bonodorajn fagopirkampojn elŝvebigantajn

abelujan aromon kaj dum li rigardis tiujn, kaptis lian menson dolĉaj antaŭbildoj pri delikataj patkukoj, bone buteritaj, garnitaj de mielo aŭ melaso far la rafinita kavethava maneto de Katrino Van-Taselo.

Tiel nutrante sian menson per multaj dolĉaj pensoj kaj "sukeraj supozoj", li vojaĝis laŭflanke de montetaro disponanta pri panorama vidaĵo laŭ kelkaj el la plej bonaj pejzaĝoj de potenca Hudsono-Rivero. La suno iompostiome radirigis sian vastan diskon okcidenten. La larĝa sino de Tapan-Lago kuŝis senmove kaj vitroaspekte, krom tio ke tie kaj tie milda ondado moviĝis kaj daŭrigis la bluan ombron de la fora monto. Kelkaj sukcenaj nuboj ŝvebis en la ĉielo sen ununura aerspiro por ilin antaŭenirigi. La horizonto elmontris belan oran koloraĵon kiu iom post iom transformiĝis en puran pomverdon kiu siavice aliiĝis en la malhelan bluon de la mezĉielo. Oblikva lumradio paŭzis sur la arbaraj firstoj de la klifegoj superpendantaj kelkajn areojn de la rivero, plimalheligante la preskaŭ nigrajn grizon kaj purpuron de iliaj rokaj muroj. Fordistance lantanta slupo, malsuprenfalante laŭ la tajdoritmo dum ĝia velo pendis senutile kontraŭmasten kaj la reflektoj de la ĉielo speguliĝis en la trankvila akvo, aspektis kiel ŝipo pendanta en la aero.

La tago jam vesperiĝis kiam Ikabodo atingis la kastelon de S-ro Van-Taselo, plenegan je la plej estimataj kaj sukcesintaj homoj de la apuda regiono. Maljunaj kultivistoj—magra, ledvizaĝa gento—surportantaj hejmfaritajn jakojn kaj pantalonojn, bluajn ŝtrumpojn, grandegajn ŝuojn kaj belegajn stanalojajn bukojn. Iliaj energiaj ŝrumpintaj edzinetoj vestitaj en kapformaj krispigitaj ĉapoj, longtaliaj etroboj, hejmkudritaj subjupoj, kun tondiloj kaj pinglokusenetoj kaj gajaj kalikotaj poŝoj pendantaj ekstere. Plenfiguraj fraŭlinoj, preskaŭ tiel antikvamodaj kiel siaj patrinoj, krom tie kie pajloĉapelo, altkvalita rubando aŭ eble blanka frako, malkaŝis simptomojn de urba noviĝo. La filoj, surportantaj mallongajn kvadratrandajn jakojn havantajn longajn vicojn da mirindaj latunaj butonoj kaj elmontrantaj kapdorsajn harplektaĵojn laŭ la modo de la epoko, precipe se ili sukcesis akiri tiucelan angilhaŭton, multe estimatan tra la regiono kiel potencan harnutrilon-kaj-fortikigilon.

Bromo Ostaro tamen estis la heroo de la sceno, alveninte la kunvenon surdorse de sia plej ŝatata rajdbesto, Ĉioriskulo, estaĵo, same kiel li, plena je spirito kaj malico, kaj kiun kapablis mastri neniu krom li. Li famiĝis efektive kiel viro preferanta atakemajn bestojn emantajn efektivigi ĉiuspecajn ruzmanovrojn konstante minacantajn la bonfarton de la rajdanto, ĉar li opiniis ke obeema, bonkonduta ĉevalo maltaŭgas al verva knabo.

Tre plaĉus al mi paŭzi ĉi-tie por primediti la mondon da ĉarmoj kiu ektrafis la ravitan rigardon de mia heroo kiam li eniris la gastosalonon de la Van-Tasela domego. Ne tiuj de la aro da plenformaj junulinoj kun ilia luksa ekspocizio de ruĝo kaj blanko sed la malavaraj ĉarmoj de aŭtenta Nederlanda kamparsocia tetablo en la riĉega aŭtuna sezono. Tiom da pladoj ŝarĝitaj de amasoj da diversaj, preskaŭ nepriskribeblaj kukoj kiujn scipovas baki nur spertaj Nederlandaj dommastrinoj! Inkluziviĝis la timiga pastokuko, la pli afabla oleokuko kaj la krusta kaj dispeciĝema tordbulo; sukerkukoj kaj buterkukoj, zingibrokukoj kaj mielkukoj kaj la tuta kukofamilio. Apud tiuj elmontriĝis pomtortoj, persiktortoj kaj kukurbtortoj; kaj aldone tranĉaĵoj da ŝinko kaj bukanita bovaĵo; kaj poste teleroj da bonsaporaj konfititaj prunoj, persikoj, piroj kaj cidonioj; krome, rostitaj alozo kaj kokinoj; kune kun bovloj da

lakto kaj kremo, ĉiuj interaranĝite ege ĥaose, iom laŭ la ordo de mia rakontado, dum meze de tiuj—nia alta Ĉielo benu la lokon—staris la tekruĉo, suprenlevante nubojn de vaporo. Mankas al mi spiro kaj tempo por pridiskuti tiun bankedon laŭ ĝiaj meritoj kaj mi ege avidas repreni la evolufadenon de mia rakontado. Feliĉe, Ikabodo Gruo ne tiom hastis kiel sia historiisto kaj li dece traktis ĉiun bongustaĵon.

Li estis bonvola kaj dankema persono kies koro ŝvelis samritme kiel lia korpo kontentiĝis kaj kies spirito vigliĝis post bona manĝado samritme kiel la spiritoj de aliaj viroj post multa drinkado. Krome, manĝante, li ne povis malkonsenti ĉirkaŭpasigi sian rigardon kaj subridi pri la eblo povi ekestri iun tagon tiun tutan scenon de preskaŭ neimageblaj lukso kaj riĉeco. Tiam li pensis kiel rapide li sin forturnos disde la malnova lerndomo, klakigos la fingrojn antaŭ la vizaĝo de Johano Van-Ripero kaj ĉiu cetera avara patrono, kaj eksterdomigos piedbate ĉiun vagabondan pedagogon kuraĝintan lin nomi kamarado.

Multaĝulo Baltuso Van-Taselo ĉirkaŭvagadis inter siaj gastoj kun la vizaĝo dilatita pro kontentiĝo kaj bonhumoro, same ronda kaj gaja kiel rikoltsezona luno. Liaj gastamaj atentaĵoj estis mallongdaŭraj sed signifoplenaj, konsistante el manpremoj, ŝultrobatetoj, laŭtaj ekridoj kaj urĝaj invitoj: "Ekmanĝu! Vin provizu!"

Kaj nun la sono de la muziko eliranta la komunĉambron aŭ halon alvokis ĉiujn al la balo. La muzikanto estis maljuna grizhara Negro kiu jam de pli ol duonjarcento rolis kiel migra orkestro de la regiono. Lia muzikilo estis preskaŭ tiel malnova kaj eluzita kiel li mem. La plej grandan parton de la tempo li surskrapis du-tri kordojn, akompanante ĉiun arĉmovon kun samtempa kapmovo, antaŭenkliniĝante preskaŭ ĝistere kaj piedbatante ĉiun fojon kiam alvenis danci nova paro.

Ikabodo fieris tiom pri sia danckapablo kiel pri siaj kantotalentoj. Nenia korpomembro, nenia karnofibro senokupis ĉe li. Vidinte lian malkompakte muntitan korpoframon en plena moviĝado, klakade rondirantan en la ĉambro, vi supozintus ke Sankta Vito mem, tiu benita patrono pri dancado, surscenejiĝas proprapersone antaŭ vi. Li estis admirata de ĉiuj Negroj de la bieno kaj la ĉirkaŭanta komunumo kiuj, kuniĝinte, ĉiuaĝaj, ĉiudimensiaj, konsistigis piramidaĵojn da brilaj Nigraj vizaĝoj, starante amase ĉe ĉiu pordo kaj fenestro, spektadante kun ravo la scenon, rulante siajn blankajn okulglobojn, elmontrante de orelo al orelo larĝe ridetantajn vicojn da eburkoloraj dentoj.

Kiel la buboskurĝanto povus konduti alie ol vigle kaj ĝoje? La mastrino de lia koro estis lia kundancantino kaj ridetis afable responde al liaj amaj okulumadoj. Dume, Bromo Ostaro, ege frapite de amo kaj envio, sidis sole kaj paŭte en fora ĉambroangulo.

Kiam la dancado finiĝis, Ikabodo aliris interparoli kun ensemblo da saĝuloj sidantaj kaj fumantaj kun maljuna Van-Taselo ĉe unu ekstremaĵo de la galerio kie ili klaĉadis pri antaŭaj tempoj kaj rakontis longajn anekdotojn pri la milito.

La regiono, en la tempo pri kiu mi parolas, estis unu el tiuj bonfavoritaj lokoj en kiuj kronikoj kaj heroaj viroj abundas. La Brita-Usona batallinio etendiĝis proksime al ĝi dum la milito. Ĝi rolis tial kiel prirabejo kiun infestis rifuĝintoj, gerilistoj kaj ĉiuj specoj de limlinia kavalireco.

Nun forpasis, kvankam apenaŭ, sufiĉe da tempo por povigi ĉiun rakontanton ornami sian rakonton per kelkaj belaj fikcioj kaj, pro la malprecizo de siaj memoraĵoj, sin heroigi en ĉiu rakontata bravaĵo.

Estis la rakonto pri Dofuo Martlingo, grandkorpa, blubarba Nederlandano preskaŭ kaptinta Britan fregaton kun malnova naŭfunta ferkanono pafanta ekde kotbarikado, krom tio ke je la sesa salvo la armilo eksplodis. Kaj estis la maljuna sinjoro—li restu anonima estinte ĝentilhomo tro riĉa por ke mi nomu lin nur rapidvorte—kiu, dum la batalo de Blanka-Ebenaĵaro, estante bonega defendomajstro, deturnis musketkuglon per eta glavo. Laŭ lia raporto la kuglo ĉirkaŭzumis la klingon kaj forkarambolis de sur la manŝirmilo kaj li pretis certigi la raporton ĉiumomente, elmontronte la glavon kun ties iom fleksita ŝirmilo. Estis pluraj ceteraj, egalvalore estimiĝintaj sur la batalkampo, neniu el kiuj maldubis pri la gravo de sia propra agado kaj la influo kiun tiu estigis sur la finan venkon.

Sed ĉiuj tiuj neniel gravis kompare al la pli sukcesaj legendoj pri fantomoj kaj aperaĵoj. La komunumo riĉas je tiaj legendaj trezoroj. Lokaj fabloj kaj superstiĉoj pli bone prosperas en tiuj izolitaj, de longe enloĝataj retiriĝejoj sed nun tretas ilin subpiede la nomadega homamaso aktuale konsistiganta la loĝantaron de la plej multnombraj el niaj kamparejoj. Krome, fantomoj spertas nenian kuraĝigon en la plejparto el niaj vilaĝoj ĉar ili apenaŭ ĝuas la tempon finsperti sian unuan dormeton kaj sin renversi en siaj tomboj antaŭ ol iliaj travivintaj amikoj jam forlasas la najbarejon. Tial kiam ili eltombiĝas nokte por ĉirkaŭpromeni, restas al ili neniaj viziteblaj konatoj. Jen sendube la kialo pro kiu ni nur malofte aŭdas pri fantomoj escepte kiam temas pri niaj de longe enloĝataj Nederlandaj komunumoj.

La tuja kaŭzo tamen—la ofteco de supernaturaj rakontoj en tiuj lokoj—atribueblas sendube al la proksimeco de Dorm-Valeto. Kontaĝon alportis la aero mem elblovanta tiun hantejon. Ĝi elspiris etoson de revoj kaj fantazioj infektantan la tutan landon. Pluraj Dorm-Valetanoj partoprenis en la ĉe-Van-Tasela festo kaj, kiel kutime, disrakontis siajn sovaĝajn kaj mirindajn legendojn. Multaj mornaj historietoj raportiĝis pri funebraj procesioj, okazintaj kun malgajaj ploregoj kaj plendoj proksime al la arbego, ankoraŭ staranta en la najbarejo, kie la bedaŭrinda Majoro Andreo punmortis. Ankaŭ iom menciiĝis la virino vestita en blanko kiu hantis la senluman ravineton ĉe Korak-Rokego kaj ofte aŭdiĝis kriegante en antaŭŝtormaj vintronoktoj, pereinte tie en la neĝo. Plejparte tamen temis kutime en la rakontoj pri la plej ŝatata fantomo de Dorm-Valeto, la senkapa rajdanto, kiu aŭdiĝis plurajn fojojn tre lastatempe, patrolante la kamparon kaj, laŭraporte, ŝnurante sian ĉevalon ĉiunokte inter la tomboj de la preĝeja antaŭkorto.

La izolita situloko de la preĝejo, ekde ĉiam verŝajne, igas ĝin ŝatata hantejo de ĉagrenitaj spiritoj. Ĝi staras sur altaĵeto, ĉirkaŭate de robinioj kaj altegaj ulmoj, de inter kiuj ĝiaj decaj, kalkolaktitaj muroj elbrilas modeste, kiel Kristana pureco transbrilanta la rulkurtenojn de la dormĉambro. Malkruta deklivo descendas de ĝi ĝis arĝenta akvotavolo ĉirkaŭlimigata de altaj arboj inter kiuj povas ekvidiĝi la bluaj montetoj de Hudsono-Rivero. Rigardante ĝian gazonkorton kie la sunradioj ŝajnas dormadi tiom trankvile, oni povus supozi ke tie almenaŭ la mortintoj rajtas ripozi en paco.

Unuflanke de la preĝejo etendiĝas larĝa boskovaleto laŭ

kiu granda rojo bruegas inter rompitaj rokoj kaj trunkoj de falintaj arboj. Super profunda, nigra parto de la rojo, ne malproksime disde la preĝejo, lignoponto antaŭatempe transĵetiĝis. La alvenvojon kaj la ponton mem superpendantaj arboj dense ombradis, volvante tiulastan en malhelo eĉ dumtage sed estigante timigan nigregon dumnokte.

Ĉi-tiu estis unu el la plej ŝatataj hantejoj de la senkapa rajdanto kaj la loko kie li la plej ofte renkontiĝis. Oni rakontis la sperton de Multaĝulo Braŭvero, la plej hereza el la prifantomaj malkredantoj. Li renkontis la rajdanton revenante de vizito al Dorm-Valeto kaj devis ekrajdi samĉevale malantaŭdorse de la fantomo. Ili galopis traarbuste-trapteride, transmontete-transmarĉe, ĝis atingi la ponton. Tie subite la rajdanto aliiĝis en skeleton, ĵetis la maljunulon en la rojon kaj foriris en fulmo kaj tondro, sin lanĉante super la arbosupraĵojn.

Tuj egalis tiun rakonton tri mirindaj aventuroj de Bromo Ostaro, kiu primokis la galopantan Heson, dirante ke tiu estas nomada ĉarlatano. Li deklaris ke kiam li revenis unu nokton de najbara vilaĝo Singo-Singo kaj kiam devancis lin tiu noktomeza trupano, li proponis vetrajdi kun tiu kontraŭ bovlo da punĉo. Li aldone raportis ke li gajnintus la veton, ĉar Ĉioriskulo nepre venkis la koboldĉevalon. Tamen kiam ili atingis la preĝejan ponton, la Heso kabeis kaj malaperis en eka fajrbrilo.

Ĉiuj tiuj raportaĵoj, rakontite en tiu dormema subtono kun kiu homoj parolas en la malhelo, dum la vizaĝoj de la aŭskultantoj nur foje kaj refoje ricevis hazardan reflekton de la ekbrilo de iu pipo, penetris profunde en la menson de Ikabodo. Li respondis reciproke per longaj eltiroj prunteprenitaj de lia netaksebla aŭtoro Kotono Matero, kaj aldonis multajn mirindajn eventojn okazintajn en lia denaska ŝtato Konektikuto kaj timigajn vidajojn kiujn li spertis dum siaj ĉiunoktaj piedpromenadoj en Dorm-Valeto.

Nun la festeno finiĝis. La maljunaj kultivistoj kunigis siajn familiojn en siaj ĉaroj kaj aŭdiĝis dum kelke da tempo veturante klakante laŭ la valetaj vojoj kaj trans la forajn montetojn. Kelkaj fraŭlinoj rajdis sur kromseloj malantaŭ siaj plej ŝatataj amkandidatoj, kaj ilia leĝerkora ridado, miksite kun la hufbruo de la ĉevaloj, eĥadis laŭ la silentaj boskoterenoj, mallaŭtiĝante pli kaj pli ĝis nepra finaŭdiĝo—kaj la lastatempa sceno de bruo kaj kapriolado ekestis silenta kaj dezerta. Ikabodo tamen iom lantis, laŭ la kutimo de kamparaj amindumantoj, por interparoli kun la heredontino, nepre konvinkite nun progresi sur ĝissukcesa vojo.

Kio okazis dum la intervjuo mi ne entreprenu diri. Efektive tion mi ne scias. Mi devas timi tamen ke io misiĝis ĉar, post mallonga tempo, li ja ekeliris kun malfeliĉa kaj morna mieno. Ho, tiuj virinoj! Tiuj virinoj! Ĉu eblas ke tiu knabino efektivigis kelkajn koketajn ruzojn siajn? Ĉu tio ke ŝi kuraĝigis la kompatindan pedagogon estis nura artifiko havanta la celon certigi venkon kontraŭ lia rivalo? La respondon nur Ĉielo scias, ne mi! Sufiĉu diri ke Ikabodo eliris ŝtelpaŝe kun la aspekto de kokineja rabisto, ne tiu de virinkora konkerinto. Rigardante nek dekstren nek maldekstren por ĉirkaŭkontroli la panoramon de kampara riĉeco pri kiu antaŭe li tiel ofte avarĝojaĉis, li iris rekte al la stablo kaj, per pluraj energiaj man- kaj piedbatoj, vekis sian rajdbeston ege malĝentile el la komfortejo kie tiu ĝuis profundan dormadon, sonĝante pri amasegoj da maizo kaj aveno kaj vastaj valoj plenaj je fleo kaj trifolio.

Estis la nokta sorĉhoro kiam Ikabodo, malĝojkore kaj senkuraĝe, laŭiris sian ĝishejman vojon, laŭ la deklivoj de la altaj montetoj elstarantaj super Lanto-Vilaĝo kaj kiujn antaŭe en la posttagmezo li trairis tiom ĝoje. La horo estis same morna kiel li mem. Malproksime sub li Tapan-Lago etendis sian malhelan kaj malklaran akvodezerton, elmontrante diversloke altan maston de slupo sidanta trankvile ankrite kontraŭtere. En la nepra noktomeza silento li aŭdis la bojadon de gardhundo patrolanta sur la kontraŭa bordo de Hudsono-Rivero. Sed tio estis tiel svaga kaj mallaŭta ke ĝi prikonsciigis ĉe li nur la malproksimecon de tiu lojala kuniranto de la homaro. Cetere, foje kaj refoje, la longdaŭra kokerikado de iu virkoko, hazarde vekita, eĥadis fore, forege, el kultivista domo situanta intermontete, sed la bruo atingis liajn orelojn kiel sonĝsono. Neniaj vivosignoj sentiĝis proksime al li, krom malofta grilĉirpo aŭ eble guturala ekvibro de virrano kiu, loĝante en najbara marĉo, dormis malkomforte kaj ekturniĝis surlite.

Ĉiuj fantomo- kaj koboldorakontoj aŭditaj de li dum la posttagmezo nun kunamasiĝis en lia memoro. La nokto pli kaj pli malheliĝis. La steloj ŝajnis sinki pli profunde en la ĉielo kaj pelantaj nuboj ilin malaperigis de tempo al tempo el lia vidkampo. Neniam li sin sentis tiel soleca kaj senĝoja. Li alproksimiĝis krome la lokon mem kie la eventoj de multaj el la fantomrakontoj surscenejiĝis. Meze de la vojo elstaris grandega tuliparbo kiu superaltis kiel giganto la ceterajn arbojn de la najbarejo, konsistigante specon de orientilo. Ĝiaj branĉoj, torditaj kaj fantaziaj, estis tiel dikaj kiel la trunkoj de ordinaraj arboj, kliniĝante preskaŭ ĝistere antaŭ ol releviĝi en la aeron. Ĝi jam rolis en la tragika raporto pri la malbonŝanca Andreo militkaptita tre proksime, pro kio ĝi universale kromnomiĝis "la arbo de Majoro Andreo". La popolamaso konsideris ĝin kun miksaĵo da respekto kaj superstiĉo, duone pro kompato pri la sorto de ties malbonfortuna samnomulo, duone pro la rakontoj pri strangaj vidaĵoj kaj malgajaj lamentadoj kiujn oni ĉirkaŭaŭdigis pri ĝi.

Dum Ikabodo alproksimiĝis tiun timindan arbon, li komencis lipfajfi. Li kredis aŭdi respondan fajfadon: tio estis nur ventoblovaĵo sin pelinta akratone tra la sekaj branĉoj. Kiam li alvenis iom pli proksime li opiniis ekvidi blankaĵon pendantan mezarbe: li paŭzis kaj ĉesis fajfi. Kiam li rigardis pli atente tamen li konsciis ke temas pri loko kie fulmo trafis la arbon kaj malkovris la suban blankan lignon. Subite li aŭdis ĝemadon. Liaj dentoj klaketadis kaj liaj genuoj batis kontraŭselen: tio estis nur unua branĉego frotinta duan dum la vento ilin ambaŭ vagbalancadis. Li preterpasis la arbon sekure, sed lin atendis novaj danĝeroj.

Proksimume ducent jardojn for de la arbo eta rojo transiris la vojon kaj eniris kotan, densboskan terkavaĵon konatan laŭ la nomo Vilejo-Marĉo. Pluraj krudaj ŝtipegoj, apudmetite, rolis kiel transroja ponto. Jenflanke de la vojo kie la akvoflueto eniris la boskon, aro da kverkoj kaj kaŝtanoj, pezege implikite per sovaĝaj vitoj, ĵetis kavernspecan malhelon sur ĝin. Transiri tiun ponton fariĝis malfacilega provo. Ĉe tiu sama loko mem la malbonsorta Andreo kaptiĝis kaj sub la kovraĵo estigita de tiuj kaŝtanoj kaj vitoj kaŝiĝis la fortikaj rajdmilicanoj lin surprizintaj. Ekde tiam, eĉ hodiaŭ, ĉiuj taksas la lokalon kiel hantitan rojon kaj terurfrapitaj estas la sentoj de la lerneja knabo devanta ĝin preterpasi solapersone post la sunsubiĝo.

Dum li alproksimiĝis la rivereton lia koro komencis bategi. Li amasigis tamen sian tutan rezolutecon, piedbatis sian ĉevalon

surripare dekduon da fojoj kaj entreprenis transiri haste la ponton. Sed anstataŭ ekkuri antaŭen la perversa maljuna bestaĉo flankenmoviĝis, trafante la barilon. Ikabodo, kies timo pligrandiĝis pro la prokrasto, ektiris la bridrimenon en la kontraŭa direkto kaj batis malavare per la kontraŭflanka piedo. Ĉio vanis. Lia besto ekmoviĝis, verdire, sed nur sukcesis enplonĝi densejon da dornarbustoj kaj alnoj situantan aliflanke de la vojo.

Nun la lernejestro utiligis kaj vipon kaj kalkanon sur la senkarnajn ripojn de la maljuna Pafilpulvo kiu antaŭenhastegis, snufadante kaj ekronkante, tamen eksenmoviĝis apud la ponto kun subito kiu preskaŭ antaŭenĵetis superkape sian rajdanton. En tiu sama momento la delikata aŭdkapablo de la lernejestraj oreloj perceptis likvaĵan apudpontan piedpaŝegon. En la malhela ombro de la bosko, sur la rojrando, li ekvidis gigantan, misforman, nigran, turegantaĵon. Tiu restis senmove sed havis kuntiriĝintan aspekton, kvazaŭ kolosega monstro preta sin lanĉi kontraŭ la vojaĝanton.

La haroj de la timigita pedagogo elstariĝis surkape pro teruro. Kion fari? Jam forpasis la oportuno turniĝi kaj forfuĝi. Krome, kiun ŝancon li havus eskapi fantomon aŭ koboldon—se temis pri tiaĵo—povantan surrajdi la flugilojn de la vento? Tial, estigante ioman pseŭdokuraĝon, li demandis balbutante: "Kiu vi estas?" Nenian respondon li ricevis. Li ripetis la demandon en ankoraŭ pli maltrankviltona voĉo. Daŭre okazis nenia respondo. Novan fojon li piedbatis la flankojn de la senmova Pafilpulvo kaj, fermante la okulojn, kun senintenca fervoro ekpsalmis preĝejan himnon.

En tiu momento la timiga ombraĵo ekmoviĝis kaj, pergrimpe, persalte, subite ekstariĝis meze de la vojo. Kvankam la nokto estis malhela kaj morna, la formo de la nekonataĵo nun iom konstateblis. Ĝi ŝajnis esti vastdimensia rajdanto sidanta sur fortikframa nigra ĉevalo. Ĝi faris nek minacan geston, nek afablan inviton, preferante sin apartigi aliarande de la vojo, antaŭentrotante blindaflanke de multaĝa Pafilpulvo, kiu nun renormaliĝis post siaj timo kaj obstino.

Ikabodo, al kiu tiu stranga noktomeza kunrajdanto nepre malplaĉis, kaj memorante la aventuron kiun Bromo Ostaro spertis kun la Galopanta Heso, plirapidigis sian ĉevalon, esperante forlasi la fremdaĵon. Ankaŭ tiu tamen plirapidigis sian ĉevalon, egalante la progreson de Ikabodo. Tiulasta malrapidiĝis, ekpromenadpaŝigis sian beston, intencante lanti malantaŭe—la aliulo same agis. Lia koro komencis malfortiĝi. Li ekstrebis reaktivigi sian psalmokantadon sed lia malsekigita lango algluiĝis al lia palato kaj la notoj mortis en lia gorĝo. En la malbonhumora kaj obstina silento de tiu insista kunulo kaŝiĝis io mistera kaj ege timiga. La afero baldaŭ klariĝis.

Laŭgrimpante ioman deklivon reliefigantan kontraŭĉielen la figuron de lia kunvojaĝanto, gigante altan kaj envolvitan en mantelo, Ikabodo hororegis, ekkonsciante ke tiu senkapas. Lia hororo pligrandiĝis kiam li rimarkis ke la mankantan kapon, anstataŭ porti ĝin surŝultre, la fremdaĵo-fremdulo transportis antaŭ si sur la selpomelo. La teruro de Ikabodo atingis senesperan nivelon. Li strebis instigi Pafilpulvon per kaskadaĵo da man- kaj piedbategoj, dezirante per subita moviĝo preterkuregi sian kunulon, sed la fantomo subitmoviĝis samritme kiel li. Tial kune ili ekkuregis, vole malvole, dum ŝtonoj forflugetis kaj fajreroj ekbruletis je ĉiu salto. La malpezaj vestaĵoj de Ikabodo flirtadis en la aero dum li etendis sian longan, magran korpon super la kapo de sia ĉevalo pro sia avida

deziro forfuĝi.

Ili nun atingis la vojon kiu flankenturniĝas en la direkto al Dorm-Valeto. Tamen Pafilpulvo, laŭŝajne sorĉite per demono, anstataŭ resti survoje, turniĝis kontraŭdirekten kaj plonĝis impete laŭdeklive, descendante malrektaflanke. Tiu vojo trairas sablan kavaĵon ombratan de arboj dum preskaŭ kvaronmejlo, kie ĝi transiras la ponton tiam faman en lokaj fantomrakontoj kaj aliflanke de kiu suprenŝvelas la verda monteto sur kiu staras la kalkolaktita preĝejo.

Ĝis nun la paniko de la ĉevalo havigis al ĝia malcerta rajdanto ŝajnan avantaĝon en la konkurso. Bedaŭrinde ĵus kiam li atingis la mezan punkton de la kavaĵo, la selzono cedis kaj li sentis ĝin forgliti de sub li. Li mankaptis ĝin perpomele kaj strebis ĝin reteni surĉevale, tamen sensukcese. Restis al li nur sufiĉe da tempo por ĉirkaŭbraki la kolon de multaĝa Pafilpulvo antaŭ ol la selo terenfalis kaj li aŭdis sian postkuranton ĝin treti subpiede.

Dummomente trapasis lian menson timo pri la kolero de Johano Van-Ripero ĉar estis la dimanĉa selo de tiu. Al la momento tamen maltaŭgis etaj timoj. La koboldo postkuris lin proksimegdistance kvazaŭ preta ekrajdi lian postaĵon mem kaj, estante malbonlerta ĉevalisto, li spertis grandan ĝenon penadante reteni sian sidpozon. Foje li glitis unuflanken; alifoje, aliflanken. Multfoje li sidsaltis sur la alta kresto de la ĉevala spino kun tiom da fortego ke li timis sperti tujan tiean korpofendiĝon.

Malfermaĵo en la arboj nun kuraĝigis lin esperi ke la preĝeja ponto proksimas. La ŝanceliĝanta reflekto de arĝenta stelo en la rojo sciigis al li ke li ne eraras. Li vidis la murojn de la preĝejo lumetantajn malhele sub la foraj arboj. Li memoris la lokon kie malaperis la fantoma kontraŭstaranto de Bromo Ostaro. "Se mi nur sukcesos atingi tiun ponton," pensis Ikabodo, "mi estos sekura."

En tiu momento li aŭdis la nigran ĉevalon anhelantan kaj blovantan malantaŭ li. Li eĉ kredis senti ĝian varman spiradon. Novfoja konvulsia piedbato en la riparon kaj multaĝa Pafilpulvo sursaltis la ponton. Ĝi kuregis tondrobrue trans la eĥantajn tabulojn, atingis la kontraŭan bordon. Nun Ikabodo rigardis malantaŭen kontrolante ĉu lia postsekvanto malaperos, laŭtradicie, en ekbrilo de fajro kaj sulfuro. En tiu momento mem li vidis la koboldon elstariĝi en siaj piedingoj entreprenante antaŭenlanĉi sian kapon kontraŭ la lernejestron. Ikabodo strebegis eviti la hororan misilon sed li tro malfruis. Ĝi trafis lian kranion kun grandega kolizio kaj faligis lin kapon antaŭen en la polvon. Pafilpulvo, la nigra ĉevalo kaj la koboldrajdanto lin preterpasis, ĉiuj tri, tornadrapide.

La sekvintan matenon la maljuna ĉevalaĉo troviĝis sensele antaŭ la barilpordo de sia mastro. Dum ĝia brido kuŝis subpiede ĝi solene maĉadis tiean herbon. Ikabodo ne aperis matenmanĝhore. Tagmezhore li ne aperis. La knaboj kunvenis ĉe la lernejo kaj vagpromenadis laŭborde de la rojo. Nenia lernejestro. Johano Van-Ripero komencis iom maltrankviliĝi pri la sorto de la kompatinda Ikabodo kaj sia selo. Enketo ekestiĝis kaj post zorga esplorado oni trovis spurojn de li. En unu parto de la vojo iranta al la preĝejo oni trovis la selon tretitan en la teron. La spuroj de ĉevalhufoj, profunde enfiksite en la vojo kaj verŝajne kun furora rapideco, kondukis al la ponto preter kiu, sur la bordo de larĝa parto de la rivereto kie la akvo fluis pli profunde kaj pli nigrakolore,

troviĝis la ĉapelo de la malbonŝanca Ikabodo kaj proksime al ĝi frakasita kukurbo.

Oni priserĉis la rojon, sen malkovri tamen la kadavron de la lernejestro. Johano Van-Ripero, kiel ekzekucianto pri lia heredaĵo, kontrolis la pakon enhavantan liajn ĉiujn surterajn posedaĵojn. Tiuj konsistis el du ĉemizoj kaj duono; du kolskarpoj; unu-du paroj da glatlanaj ŝtrumpoj; malnova ĝisgenua korduroja pantalono; rusta razilo; libro da psalmhimnoj kun multaj kornitaj paĝoj; kaj rompita diapazono.

Pri la libroj kaj mebloj de la lernejo, ili apartenis ĉiuj al la komunumo krom _Historio de Sorĉarto_, verkita de Kotono Matero; _Nov-Anglia Almanako_; cetera libro pri sonĝoj kaj sortdivenado kaj, en tiulasta, malmultkosta paperfolio surportanta skribaĉaĵojn kaj inkmakulojn faritajn okaze de sensukcesaj klopodoj kopii poemojn honorantajn la heredontinon de Van-Taselo. Tiujn magi- kaj poezilibrojn tuj bruligis Johano Van-Ripero kiu decidiĝis de tiam antaŭen ne plu edukigi siajn gefilojn ĉelerneje, opiniante ke laŭ lia scio, la leg- kaj skribartoj neniam efektivigas bonajn rezultojn. Kiom ajn da mono la lernejestro posedis—li ricevis sian kvaronjaran salajron nur unu-du tagojn antaŭe—li kunportis tion sendube surpersone en la momento de sia malapero.

La mistera evento instigis grandan spekulativadon ĉepreĝeje la sekvintan dimanĉon. Aroj da spektantoj kaj klaĉemuloj kuniĝis en la preĝeja antaŭkorto, ĉe la ponto kaj tie kie troviĝis la ĉapelo kaj la kukurbo. Rememoriĝis la rakontoj de Braŭvero kaj Bromo Ostaro kaj tuta repertuaro da ceteraj samspecaj raportaĵoj. Kiam la diskutpartoprenantoj konsideris ĉiujn tiujn kaj komparis ilin kun la simptomoj de la koncerna kazo, ili ŝancelis la kapon kaj finkonkludis ke Ikabodon la Galopanta Heso fortransportis. Pro tio ke li estis fraŭlo kaj ŝuldis monon al neniu, neniu pasigis pluan tempon maltrankviliĝante pri li. Oni translokigis la lernejon al alia najbarejo kie alia pedagogo lin anstataŭis.

Vere estas ke maljuna kultivisto vizitinta Nov-Jorkon plurajn jarojn poste kaj dissciigintan la nunan raporton pri la fantoma aventuro, aldone informis ke Ikabodo Gruo daŭre vivas; ke li forlasis la najbarejon duone pro timo pri la koboldo kaj Johano Van-Ripero, duone pro embaraso pri sia forsendiĝo ĉemane de la heredontino; ke li translokiĝis al fora regiono de la lando; ke li tie instruis kaj samtempe fakiĝis pri juro, advokatiĝis, politikistiĝis, kandidatiĝis, ĵurnalistiĝis kaj juĝistiĝis en malalttribunalo.

Bromo Ostaro, kiu baldaŭ post la malapero de sia rivalo edziĝis triumfe kun la floriĝanta Katrino, ĉiam elmontris ĉioscian mienon kiam ajn oni rakontis la aventuron de Ikabodo kaj ĉiam ekridegis plenpulme kiam menciiĝis la kukurbo, pro kio kelkaj homoj suspektis ke li scias pli longe pri la afero ol li bonvolas raporti.

La multaĝaj kamparaj edzinoj, tamen, la plej bonaj juĝantoj pri tiuj aferoj, asertas eĉ ĝis hodiaŭ mem ke Ikabodo forŝteliĝis pere de supernaturaj rimedoj, ĉio kio estas unu el la plej ŝatataj historietoj ofte rakontataj en la najbarejo ĉirkaŭ vintraj vesperfajroj.

La ponto fariĝis pli ol iam fokuspunkto de superstiĉa miro kaj povas esti ke jen la kialo pro kiu dum lastatempaj jaroj oni ŝanĝis la itineron de la vojo, rezulte de kio ĝi nun aliras la preĝejon laŭpasante la bordon de la muellageto.

Forlasite, la lernejo baldaŭ malkomponiĝis kaj ĝin ekhantis, laŭraporte, la fantomo de la malbonŝanca pedagogo. Plugknaboj, lantante sur la ĝishejma vojo en trankvila somervespero, ofte kredas aŭdi la voĉon de Ikabodo, ĉantantan en fora distanco malgajan psalmomelodion inter la pacaj solecejoj de Dorm-Valeto.

## POSTINFORMO ALDONITA EN LA MANSKRIBADO DE S-RO KNIKERBOKERO

La antaŭa rakonto raportiĝas en preskaŭ la sammemaj vortoj en kiuj mi aŭdis ĝin raportitan ĉe korporacia kunveno de la multaĝa urbo Manhatuso, kunveno kiun ĉeestis multaj el la plej saĝaj kaj plej estimataj burĝoj de la urbo. La rakontinto estis afabla, kaduka, sinjorema maljunulo vestita sal-kaj-piprokolore kaj elmontranta malĝoje komikan vizaĝon. Mi forte suspektis lin esti malriĉa ĉar li tiel kuraĝe klopodis distri. Kiam li finrakontis sian historieton, okazis multe da ridado kaj aprobado, precipe ĉe du-tri deputitaj magistratanoj tradormintaj la plej grandan parton el la rakontotempo.

Estis tamen unu alta, sekaspekta, maljuna sinjoro kun skarabsimilaj brovoj kiu elmontris seriozan kaj iom severan mienon dum la tuta rakontado. Fojfoje li faldis la brakojn, antaŭenklinis la kapon, malsuprenrigardis, kvazaŭ kontrolante la plankon, dum li primeditadis ioman dubon. Li estis unu el tiuj singardaj homoj kiuj neniam ridas krom responde al bonega kaŭzo kiam ilin subtenas bonsenco kaj justeco. Kiam la gajeco de la aliaj ĉeestantoj finestiĝis kaj reestiĝis silento, li apogis unu brakon sur la brakon de sia seĝo kaj, arkiginte la alian, demandis, kun ege saĝaj kapmovo kaj brovkunpremo, kio estas la moralaĵo de la rakonto kaj kion ĝi pruvas?

La rakontinto, kiu lipenlevadis glason da vino, kiel postlaboran refreŝaĵon, paŭzis momenton, rigardis sian demandinton kun mieno de senfina respekto, tiam malsuprenigis la glason tre malrapide ĝistable kaj deklaris ke la rakonto celas pruvi, laŭ la plej forta logiko, la jenon:

"Ne estas vivosituacio kiu ne havigas avantaĝojn kaj plezurojn kondiĉe ke ni konsideru ŝercon nur kiel ŝercon."

"Rezulte, kiu rajdas konkurse kontraŭ koboldoj, tiu povas sendube sperti malfacilan rajdadon."

"Tial, se kampara lernejestro malsukcesas sin edzigi al Nederlanda heredontino, certe tio estas sekura paŝo en la direkto al altnivela estimo en la lando."

La singarda maljuna sinjoro kunpremis la brovojn dekoble pli streĉe post la klarigo, ege perpleksigite par la rezonado de la silogismo; dume, ŝajnis al mi, la sal-kaj-pipre vestita viro fiksrigardis lin kun iom triumfa vizaĝaĉo. Tempofine la seriozulo komentis ke ĉio tio tre bonas. Tamen, liaopinie, la rakonto iom troigas. Ĝi havas unu-du punktojn pri kiuj li dubas.

"Kredu min, sinjoro," respondis la rakontinto. "Rilate al tiu afero, mi mem ne kredas duonon el ĝi."

# Livros Grátis

( http://www.livrosgratis.com.br )

Milhares de Livros para Download:

Baixar livros de Administração
Baixar livros de Agronomia
Baixar livros de Arquitetura
Baixar livros de Artes
Baixar livros de Astronomia
Baixar livros de Biologia Geral
Baixar livros de Ciência da Computação
Baixar livros de Ciência da Informação
Baixar livros de Ciência Política
Baixar livros de Ciências da Saúde
Baixar livros de Comunicação
Baixar livros do Conselho Nacional de Educação - CNE
Baixar livros de Defesa civil
Baixar livros de Direito
Baixar livros de Direitos humanos
Baixar livros de Economia
Baixar livros de Economia Doméstica
Baixar livros de Educação
Baixar livros de Educação - Trânsito
Baixar livros de Educação Física
Baixar livros de Engenharia Aeroespacial
Baixar livros de Farmácia
Baixar livros de Filosofia
Baixar livros de Física
Baixar livros de Geociências
Baixar livros de Geografia
Baixar livros de História
Baixar livros de Línguas

Baixar livros de Literatura
Baixar livros de Literatura de Cordel
Baixar livros de Literatura Infantil
Baixar livros de Matemática
Baixar livros de Medicina
Baixar livros de Medicina Veterinária
Baixar livros de Meio Ambiente
Baixar livros de Meteorologia
Baixar Monografias e TCC
Baixar livros Multidisciplinar
Baixar livros de Música
Baixar livros de Psicologia
Baixar livros de Química
Baixar livros de Saúde Coletiva
Baixar livros de Serviço Social
Baixar livros de Sociologia
Baixar livros de Teologia
Baixar livros de Trabalho
Baixar livros de Turismo